

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1028 (42/2019)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Mia Asocio, mia Urbo.....	2
- Kongreso en Asizo .....	2
- Novaj prelegoj.....	3
- Jutuba kanalo de UEA.....	3
- Aliaj retejoj uzas esperanton .....	3
- Mediawiki .....	4
- Mesaço el la Nubo.....	4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus Esperanton.....	4
- Mesaço de Universala Esperanto-Asocio okaze de Homrajta Tago, 10 decembro, kaj Zamenhof-Tago, 15 decembro, 2019.....	5
- Pillole di Salvezza 1028: Il Conte Ugolino.....	6



## MIA ASOCIO, MIA URBO

La 10-an de septembro UEA kunlabore kun Ĉina Radio Internacia unuafoje lanĉis Filman Konkurson "Mia Asocio, Mia Urbo". Danke al via subteno ni sukcesis kolekti pli ol 20 filmojn el kvin kontinentoj. La filmoj estas spekteblaj ĉe: [https://docs.google.com/spreadsheets/d/1dMpU0qFPUQouPm2Gc\\_o7IGh7RqKaZpM8bbDHPKJS89s/edit?usp=sharing](https://docs.google.com/spreadsheets/d/1dMpU0qFPUQouPm2Gc_o7IGh7RqKaZpM8bbDHPKJS89s/edit?usp=sharing). Ni daŭre alŝutos novajn filmojn ĉi tien.

La filma konkurso finiĝos baldaŭ — la 15-an de decembro, la tagon de la Zamenhof-Festo, 160-jariĝo de lia naskiĝo. Multaj bedaŭras, ke la filma konkurso finiĝos baldaŭ, ĉar la Zamenhof-Festo estos bona ŝanco filmi la asociojn kaj la urbojn. En la lasta kunsido de la Estraro, preskaŭ ĉiuj estraranoj esprimis intereson lanĉi 2-an filman konkurson en taŭga tempo en 2020. Nun mi kore invitas interesiĝantoj filmi ĉi-jarajn aranĝojn en la Zamenhof-Festo por pretigi novajn filmojn por la konkurso en 2020.

## KONGRESO EN ASIZO

Kiel ĉiuj jam scias ontjare la itala kongreso de Esperanto okazos de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto en Asizo/Assisi, tre konata urbo meze de Italio, en regiono Umbria. Sed eble ne ĉiuj scias ke Umbria estas nomata 'la verda koro de Italio' pro ĝiaj pejzaĝoj, belega naturo, riveroj. Estas la riĉo de la diversecoj kiu beligas kaj igas interesa tiun ĉi etan grandan regionon. Pro ĉio ĉi, LKK estas plananta kun aparta zorgo la ekskursojn por vizitigi al la kongresanoj la ĉefajn vidindaĵojn kiel Akvofalo de Marmore, Bevagna, Fabriano, Gualdo Tadino, Gubbio, lago Trasimeno, Montefalco, Narni, Perugia, Spello, Torgiano.

Do ne hezitu, iru al la paĝaro de la 87<sup>o</sup> itala kongreso de Esperanto, plenigu la aliĝilon, pagu la kotizon kaj komencu revii pri ne forgesablajn someraj tagoj.

Ni laboras por vi, ni atendas vin. *La LKK*

## NOVAJ PRELEGOJ

Sono lieto di comunicare che, nella **Bitoteko** della FEI, sono appena state rese disponibili due interessanti conferenze di Carlo Minnaja:-

**La letteratura in esperanto** (<http://www.bitoteko.it/items/show/561>)  
**Per abbattere i muri, una lingua comune** (<http://www.bitoteko..it/items/show/562>). Entrambe le conferenze sono in formato PowerPoint.

Ringraziando Carlo per la sensibilità e disponibilità dimostrate, reitro l'invito a chiunque desideri salvaguardare e condividere materiale riguardante l'esperanto in Italia a visitare la **Bitoteko** (<http://www.bitoteko.it>) e contattarci.

Amike,

*Daniele BINAGHI*

## JUTUBA KANALO DE UEA

La 15-an de Majo 2009 antaŭ 10 jaroj Osmo Buller lanĉis Youtube-kanalon "UEAviva" per la unua video *Lanĉo de la kanalo* (<https://www.youtube.com/watch?v=8UrK9Y8MrBU&t=204s> )

En lastaj semajnoj la abonantoj kaj spektantoj rapide kreskis pro la Filma Konkurso "*Mia urbo, mia asocio*" lanĉita de UEA kun Ĉina Radio Internacia. Ĝis 12-a de decembro la kanalo atingis mil abonantojn, kaj havas 68.989 vidojn entute (*Laŭ raporto de Luis Obando, la volontula administranto de la videoj pri "Mia urbo, mia asocio"*).

BV aboni kaj bonigi la Kanalon UEA viva ĉe

1. <https://www.youtube.com/user/UEAviva>
2. <https://uea.org/aktuale/kinejo>

BV filmi eventon en la Zemenhof-Festo en via urbo (lando) por pretigi novan vedeon por nova filma konkurso en 2020.

## ALIAJ RETEJOJ UZAS ESPERANTON

Denove hazarde, kaj surprize, ni trovis ĉi tiun retejon:

<https://eo.unistica.com/category/interna-desegno/> kiu estas perfekte samstila en la reteja projekto, sed kun malasamaj enhavoj rilate al la antaŭa:  
<https://eo.tierient.com/category/interna-desegno/>

Ambaŭ estas certe intrigantaj kaj kunprenaj retejoj.

## MEDIAWIKI

Ho creato (tradotto) questa nuova pagina per gli addetti ai lavori su tutti i progetti di *mediawiki* in Esperanto:

[https://meta.wikimedia.org/wiki/Esperanto\\_kaj\\_Libera\\_Scio/it](https://meta.wikimedia.org/wiki/Esperanto_kaj_Libera_Scio/it)

per favore controllate se trovate errori.

## MESAĜO EL LA NUBO

Baldaŭ *Nubo.re* estos unujara, kaj mi volis diri saluton antaŭe al niaj aktivaj kaj malaktivaj, lastatempe ensalutantaj kaj longe neensalutantaj uzantoj. Estis longa kaj malfacila vojaĝo ĝis nun kun multe da problemoj kaj eraraj agoj, sed Nubo pluvivas kaj evoluas! Pro tio mi volas inviti vin, se vi ne uzis Nubo-n lastatempe aŭ nemulte, ensaluti kaj reprovu uzi ĝin. Eble vi estos agrable surprizita! :-)

Se vi ne volas esti membro plu, vi povas ensaluti kaj forigi vian konton. Sed mi esperas ke vi elektos ne forigi vian konton, male eĉ fariĝi pli oftan uzanton ;-)

Se vi estas jam aktiva uzanto mi nur volas diri ke viaj kontribuoj estas ĉiam tre bonvenaj kaj mi esperas ke la sekvonta jaro fariĝos eĉ pli nube ol la nuna!

Dankon, ĉiuj, nubumantoj en Esperantujo!

Amike, Nubo

## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!



## MESAĜO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE HOMRAJTA TAGO, 10 DECEMBRO, KAJ ZAMENHOF-TAGO, 15 DECEMBRO, 2019

Ĉiujare, la 10-an de decembro, ni festas la Tagon de Homaj Rajtoj. Temas pri la dato en la jaro 1948 kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Fundamenta al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj enskribita en ties Ĉarton estas respekto de homaj rajtoj kaj la rajto de ĉiuj homoj vivi siajn vivojn en libereco kaj digno. Artikolo 1.3 de la Ĉarto aludas al celado "antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio." Homrajta Tago estas aparte grava al nia Asocio, Universala Esperanto-Asocio, pro du kialoj.

Unue, ĝi memorigas nin, ke, jam en la jaro 1947, la nova statuto de nia Asocio enhavis deklaron, ke respekto de homaj rajtoj estas necesa kondiĉo por nia laboro kiel neregistara organizaĵo. Ankoraŭ hodiaŭ ĝi restas esenca elemento en nia laboro.

Due, Homrajta Tago okazas kvin tagojn antaŭ Zamenhof-Tago, la 15-a de decembro, la tago en kiu la fondinto de la Internacia Lingvo Esperanto, L. L. Zamenhof, naskiĝis en 1859. Niaj lokaj kaj naciaj kunlaborantoj ofte festas la Tagon de Homaj Rajtoj kaj Zamenhof-Tagon samtempe, emfazante la ligan inter la streboj de Zamenhof favore al internacia interkompreniĝo, unuflanke, kaj la rekonado de universalaj homaj rajtoj, aliflanke. La alvoko de la Ĉarto de UN pri "respekto al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio" memorigas nin, ke netolero de lingvaj diferencoj ofte formas la radikojn de ksenofobio kaj povas provoki perfortajn konfliktojn. Pro tio nia Asocio alvokas al respekto de ĉies lingvoj kaj antaŭenigas la Internacian Lingvon Esperanto kiel ponton trans lingvaj diferencoj. Okaze de Homrajta Tago 2019, ni alvokas al respekto por lingva malsameco, por ĉies rajto uzi la propran lingvon kaj por klopodoj trovi pontojn inter lingvoj, kiuj favoras egalecon, toleremon, kaj pacon. Por festi la 70-jariĝon de Unuiĝintaj Nacioj, el kiu naskiĝis la tutmonda organizita agado por antaŭenigo de la universalaj homaj rajtoj, nia Asocio elektis kiel temon por sia tutmonda kongreso en 2020 la jenan: "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiganta mondo". Prelegoj kaj diskutoj okazos dumkongrese, helpe de kompetenta teamo de aktivuloj kaj fakuloj pri la temo, sub la gvido de Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA kaj nuntempe ĉefa motoro de la rilatoj inter UEA kaj UN. Ankoraŭ estas tempo (ĝis la fino de decembro) por aliĝi je plej favoraj prezoj. Montrealo fariĝos ĉefurbo de la monda esperantistaro de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2019. Pli da informoj kaj ligoj al la reta aliĝilo troveblas ĉe antaŭa Gazetara Komunikado <https://uea.org/gk/835a1>.

<http://www.linguistic-rights.org/zamenhof-tago/2019-dec-10-15-afisho-EO.jpg>



## PILLOLE DI SALVEZZA 1028: IL CONTE UGOLINO

Il canto XXIII dell'Inferno di Dante Alighieri (il penultimo di quella Cantica della "Divina Commedia") presenta i traditori della Patria, in particolare il Conte Ugolino della Gherardesca (1210-1289) [it.wikipedia.org/wiki/Ugolino della Gherardesca](http://it.wikipedia.org/wiki/Ugolino_della_Gherardesca). Mentre esistono documenti che provano l'esistenza storica del Conte, la leggenda intorno alla sua detenzione nella Torre pisana detta "della Muda" o "della Fame", e soprattutto riguardo alle circostanze della sua morte, trova riscontro soltanto nei versi di Dante. In particolare, è controversa l'interpretazione da dare all'espressione dantesca "Poscia, più che 'l dolor, poté 'l digiuno": tradizionalmente, si ritiene che questo indichi che il Conte Ugolino, vinto dalla fame, abbia mangiato i propri figli; ma la frase è ambigua, e potrebbe benissimo significare che, alla fine, il Conte Ugolino sia morto sopraffatto dalla fame ("il digiuno") più che dal dolore. La Torre pisana in cui il Conte Ugolino sarebbe stato rinchiuso con i figli (nell'immagine, da una vecchia cartolina) ospita attualmente la Biblioteca della Scuola Normale Superiore, ed è visitabile gratuitamente, su prenotazione. Tra l'altro, sono presenti pregevoli edizioni antiche e illustrate della Divina Commedia, e di altre opere nate intorno al racconto leggendario del Conte Ugolino. Trascriviamo l'episodio dantesco, in italiano e in una (la meno nota) delle quattro traduzioni in Esperanto.

<i>INFERNO – CANTO XXXIII</i>	<i>INFERO, KANTO 33-A</i>
La bocca sollevò dal fiero pasto	Forlevis buŝon el la brutma manĝo



quel peccator, forbendola a' capelli  
del capo ch'elli avea di retro guasto.  
Poi cominciò: «Tu vuo' ch'io rinovelli  
disperato dolor che 'l cor mi preme  
già pur pensando, pria ch'io ne favelli.  
Ma se le mie parole esser dien seme  
che frutti infamia al traditor ch'i' rodo,  
parlar e lagrimar vedrai insieme.  
Io non so chi tu se' né per che modo  
venuto se' qua giù; ma fiorentino  
mi sembri veramente quand'io t'odo.  
Tu dei saper ch'i' fui conte Ugolino,  
e questi è l'arcivescovo Ruggieri:  
or ti dirò perché i son tal vicino.  
Che per l'effetto de' suo' mai pensieri,  
fidandomi di lui, io fossi preso  
e poscia morto, dir non è mestieri;  
però quel che non puoi avere inteso,  
cioè come la morte mia fu cruda,  
udirai, e saprai s'e' m'ha offeso.  
Breve pertugio dentro da la Muda,

jen la pekul', viŝante ĝin per haroj  
de l' kap', difektigita malantaŭe.  
Li diris poste: «Volas vi novigi  
doloron malesperan korpremantan  
jam eĉ en penso antaŭ ol mi diras.  
Se tamen vortoj miaj estu semo  
de malnobleg' al perfidul' mordata,  
vi kune vidus plori kaj paroli.  
Vin mi ne konas nek mi scias kial  
ĉi tien venis vi, sed Firencano  
vi vere ŝajnas, kiam mi vin aŭdas.  
Do sciu ke Graf' Ugolin' mi estis,  
kaj tiu Ruĝier' ĉefepiskopo;  
najbar', mi kial tia estas, aŭdu:  
mi, kiel pro konsiloj liaj falsaj  
al li fidinte, estis mi kaptata  
kaj mortigata, diri ne necesas.  
Sed kion vi neniel povis aŭdi,  
kruela kial estis ja mort' mia,  
do aŭdu kaj ekkonu l' ofendegon.  
Malgranda tru' en la malliberejo  
pro mi havanta de l' Malsato

<p>la qual per me ha 'l titol de la fame,  e che conviene ancor ch'altrui si chiuda,  m'avea mostrato per lo suo forame  più lune già, quand' io feci 'l mal sonno  che del futuro mi squarciò 'l velame.  Questi pareva a me maestro e donno,  cacciando il lupo e ' lupicini al monte  per che i Pisan veder Lucca non ponno.  Con cagne magre, studiose e conte  Gualandi con Sismondi e con Lanfranchi  s'avea messi dinanzi da la fronte.  In picciol corso mi parieno stanchi  lo padre e ' figli, e con l'agute scane  mi pareva lor veder fender li fianchi.  Quando fui desto innanzi la dimane,  pianger senti' fra 'l sonno i miei figliuoli  ch'eran con meco, e dimandar del pane.  Ben se' crudel, se tu già non ti duoli  pensando ciò che 'l mio cor  s'annunziava;  e se non piangi, di che pianger suoli?  Già eran desti, e l'ora s'appressava</p>	<p>nomon,  (aliajn ĝi ankoraŭ post entenos),  al mi montrita estis tra l' boraĵo  jam multajn lunojn kiam song' terura  al mi vualon ŝiris de l' estonto.  Jen tiu al mi ŝajnis gvid' kaj estro  ĉasanta lupon kun idar' al monto  pro kiu Piz' ne povas vidi Lukka'n.  Ĉashundoj kun maldikaj, ruzaj,  viglaj  Gvalandi'n kun Sismondi kaj  Lanfranki  li antaŭ frunt' metinta estis sia.  Post ir' mallonga ŝajnis al mi lacaj  idar' kaj patro, kaj per l' akraj  dentoj  ŝiratajn vidis mi iliajn flankojn.  Ekvekiĝinte antaŭ la mateno  mi aŭdis miajn kunestantajn filojn  en duondormo plore peti panon.  Kruela vi se vi jam ne kompatas  pensante kion antaŭsentis koro!  Kaj se ne ploras vi, pro ki' vi</p>
---	---



che 'l cibo ne solea essere addotto,  
e per suo sogno ciascun dubitava;  
e io senti' chiavar l'uscio di sotto  
a l'orribile torre; ond' io guardai  
nel viso a' mie' figliuoi senza far motto.  
Io non piangea, sì dentro impetrai:  
piangevan elli; e Anselmuccio mio  
disse: "Tu guardi sì, padre! che hai?".  
Perciò non lagrimai né rispuos'io  
tutto quel giorno né la notte appresso,  
infin che l'altro sol nel mondo uscìo.  
Come un poco di raggio si fu messo  
nel doloroso carcere, e io scorsi  
per quattro visi il mio aspetto stesso,  
ambo le man per lo dolor mi morsi;  
ed ei, pensando ch'io 'l fessi per voglia  
di manicar, di subito levorsi  
e disser: "Padre, assai ci fia men doglia  
se tu mangi di noi: tu ne vestisti  
queste misere carni, e tu le spoglia".  
Queta'mi allor per non farli più tristi;

ploros?  
Vekiĝis ni jam, kaj proksimiĝis  
la hor' kutima de la manĝalporto,  
kaj pro farita sonĝo ĉiu dubis.  
Kaj aŭdis mi najladi suban pordon  
de l' abomena tur', pro ki' rigardis  
senvorte mi la filojn en vizaĝon.  
Ne ploris mi sed eĉ ŝtoniĝis kore,  
ploregis ili, kaj Anselĉjo mia:  
"Vi ŝajnas tiel stranga, Patro,  
kial?".  
Ne larmis tamen mi, nek mi  
respondis  
la tutan tagon, nokton kaj  
sekvantan  
ĝis la morgaŭa Sun' al mond'  
aperis.  
Eniris kiam iom da radio  
doloran en karceron kaj mi vidis  
en kvar vizaĝoj mian mem mienon,  
mi ambaŭ manojn pro doloro  
mordis.  
Kredante ili ke pro manĝbezono  
mi faris tion, kune tuj leviĝis

lo dì e l'altro stemmo tutti muti;  
ahi dura terra, perché non t'apristi?  
Poscia che fummo al quarto dì venuti,  
Gaddo mi si gittò disteso a' piedi,  
dicendo: "Padre mio, ché non m'aiuti?".  
Quivi morì; e come tu mi vedi,  
vid'io cascar li tre ad uno ad uno  
tra 'l quinto dì e 'l sesto; ond' io mi diedi,  
già cieco, a brancolar sovra ciascuno,  
e due dì li chiamai, poi che fur morti.  
Poscia, più che 'l dolor, poté 'l digiuno».  
Quand' ebbe detto ciò, con li occhi torti  
riprese 'l teschio misero co' denti,  
che furo a l'osso, come d'un can, forti.  
Ahi Pisa, vituperio de le genti  
del bel paese là dove 'l sì suona,  
poi che i vicini a te punir son lenti,  
muovasi la Capraia e la Gorgona,  
e faccian siepe ad Arno in su la foce,  
sì ch'elli annieghi in te ogni persona!  
Che se 'l conte Ugolino aveva voce

kaj diris: "Patro, malpli ni suferos  
se manĝos vi el ni: al ni vi donis  
mizerajn tiujn karnojn, vi reprenu".  
Mi ĉesis do por ilin kvietigi;  
du tagojn dume ĉiuj restis mutaj.  
Ve! Kruel' ter', vi kial ne fendiĝis!  
Al kvara tago kiam ni alvenis  
sin ĵetis Gaddo al piedoj miaj  
dirante: "Patro, ĉu vi min ne  
helpas?".  
Li mortis tie. Kiel vi min vidas  
mi vidis fali la tri unuope  
dum kvara tag' kaj sesa, kaj jam  
blinda  
sur ĉiu mi treniĝis palpetante,  
kaj vokis mi tri tagojn la  
mortintojn.  
Poste, pli ol dolor', fastado  
povis...".  
Dirinte tion, kun l' okuloj strabaj  
kranion li reprenis la mizeran  
per dentoj hunde fortaj sur la osto.  
Ve Pizo! malhonoro de la gentoj  
de l' bela lando, kie si belsonas,

d'aver tradita te de le castella,  
non dovei tu i figliuoi porre a tal croce.  
Innocenti facea l'età novella,  
novella Tebe, Uguiccione e 'l Brigata  
e li altri due che 'l canto suso appella.

*Dante Alighieri*

najbaroj ĉar vin puni ne rapidas,  
Kapraja ekmoviĝu kaj Gorgona,  
kaj baru ili Arnon ĉe l' enfluo  
dronigu kaj en vi loĝantojn ĉiujn.  
Ĉar se Graf' Ugolin' kulpiĝis vere  
ke li perfidis vin je la kasteloj  
ne devis vi la filojn turmentegi!

*(Dante Alighieri, trad. Domenico Rivor, "L'Esperanto" 11-12/1914, p. 94-96)*